

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 4

Julio/Aŭgusto 1965



BONVENON EN STUTTGART

la grandurbo inter montaroj
kaj vitejoj

„Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA)“ okazigos sian 9an jarkunvenon de la 15a ĝis la 17a de oktobro 1965 en Stuttgart. Provizora programo troviĝas sur la paĝo 2. Jen kelkaj rimarkigoj pri situo kaj historio de la kongresloko.

Ĉarma situo ne estas merito. Sed fariĝi ekonomia kaj industria centro kaj konservi krome la graciecon de bela regiono, estas rimarkinda faro. Stuttgart vivas en la ritmo de la tempo, ĝi estas intensiva kaj plena de aktiveco, tamen ĝi konservis la karakteron de grandurbo inter arbaro kaj vitejoj.

Ankoraŭ nuntempe la urba blazono montras nigran ĉevalon sur ora fono. En la jaro 950 la duko Liutolf starigis „ĉevalinan ĝardenon“, germanlingve „Stutgarten“, el kiu evoluiĝis la posta nomo de la loko. Stuttgart ricevis la rangon de urbo

en 1250. De 1496 ĝis 1803 ĝi havis la pozicion de ĉefurbo de la duklando Virtembergo, kiu estas princa lando de 1803 ĝis 1805 kaj reĝa lando de 1806 ĝis 1918. Stuttgart estas nun la ĉefurbo de la federacia lando Badeno-Virtembergo.

La fervoje alveninto admiras la imponan stacidomon kun ĝia konata turo, kiu ne aspektas kiel 45jara. Tute apude leviĝas la fervoja direkto, kaj ĉe la kontraŭa flanko etendiĝas la granda kastela ĝardeno laŭlonge de la eleganta „König“-strato. En la paralela „Neckar“-strato troviĝas cetere la kongresejo, la bierfarejo „Wulle“. En la belega urbokerno elstaras konstruaĵoj kiel teatro, parlamentejo, nova kaj malnova kastelo kaj la reĝa palaco, kiuj grupiĝas ĉirkaŭ la kastela placo kun la alta kolono. Rimarkindan turon posedas ankaŭ la moderna urbodomo. Ĝi estas rekonstruita kiel ĉiu dua domo post la milito, kies kruelaj postsignoj preskaŭ ne plu estas videblaj.

Kiu deziras atingi la plej altan punkton de la urbo, tiu veturu per lifto en la televida turo supren ĝis la altitudo de 211 m. De tie prezentas sin nepriskribebla panoramo de grandurbo kun 650 000 enloĝantoj, kiuj loĝas sur tereno de 20 723 hektaroj. 4 960 hektaroj konsistas el arbaro, 6 000 hektaroj servas al la frukta kaj kampara kulturigado, kaj 3 622 hektaroj de vinberejoj atribuas la famon, ke Stuttgart estas unu el la plej grandaj komunumoj tiurilataj en Germanio. 18 mineralaj fontoj funkcias. Tri el ili estas uzataj kiel mineralaj termoj.

La teknika evoluo enkondukigis la pasintan jarcenton, ne laste per la aŭtomobilo, kies lulilo staris en Stuttgart. Nuntempe la elegantaj aŭtomobiloj de la firma Daimler-Benz apartenas al la plej famaj en la mondo. Po 4,4 enloĝantoj posedas unu aŭtomobilon. La trafikvojoj kontentigas, unuavice la fervojo. En Stuttgart estas remizo por elektrikaj lokomotivoj. Bonegaj, sed frekven-

titaj aŭtostratoj kondukas al ĉiuj direktoj. Dek flugkompanioj zorgas pri internaciaj komunikoj. Ankaŭ la postmilita konstruita „Neckar-“haveno ĝuas rimarkindan reputacion. 720 industriaj entreprenoj, precipe el la branĉoj elektriiko, maŝinkonstruado, ĉasikonstruado, optiko (Zeiss!) kaj tekstililoj konfirmas la progreseman staton. Sed ankaŭ la literatura vivo floras. Kun ĉ. 230 eldonejoj Stuttgart estas en gvida pozicio. La eksportvaloro en 1964 estis 1,9 miliardoj da germanaj markoj.

En tiu grandskala urbeĝo vi estos bonvenaj gastoj dum nia aŭtuna jarkunveno. La organizantoj faros sian eblon, por ke via restado fariĝu agrabla en samideana sfero. Venu multnombraj! Kiel kutime niaj eksterlandaj geamikoj estas kore invitataj partopreni nian semajnfinan jarkunvenon, la kulminon de nia asocia laboro.

W. B.

Programo de la 9a GEFA-jarkunveno en Stuttgart 15a ĝis 17a de oktobro 1965

15a de oktobro:

- 10.00 Gazetara konferenco
- 12.00 Akceptejoj malfermata
- 20.00 Kunveno de la GEFA-estraro

16a de oktobro:

- 8.00 Akceptejoj malfermata
- 9.00 Unua rondveturado tra la urbo
- 12.30 Komuna tagmanĝo en la restoracio Bürgerbräu-Wulle, Neckarstraße 50—58
- 14.00 Laborkunsido de la GEFA-estraro kaj distriktkomisiitoj (nepublika)
- 14.00 Lingva ekzameno, skriba parto (nepublika)
- 14.00 Dua rondveturado tra la urbo kun la sama programo kiel antaŭtagmeze
- 18.00 Komuna vespermanĝo en la sama restoracio kiel tagmeze
- 19.45 Distra vespero kun dancado

17a de oktobro:

- Okazo por viziti diservojn de ambaŭ konfesioj
- 9.00 Lingva ekzameno, buŝa parto (publika)
- 10.00 Teatraĵo, lumbildoj kun sonbendo pri la IFEF-kongreso en Norvegio. Fermo
- 12.30 Komuna tagmanĝo
- 12.30 Ekskurso al la „florantaj barokĝardenoj“ de Ludwigsburg. Reveno proks. je la 17a h.

9. Jahresversammlung in Stuttgart 15. — 17. Oktober 1965

Anmeldeschluß

30. September

Anmeldevordrucke

Ab August bei den Bezirksbeauftragten oder beim Sekretariat der Vereinigung erhältlich.

Beitrag

1,50 DM, vorauszahlbar auf Konto 70 248 zugunsten der Esperanto-Gruppe im BSW Stuttgart.

Kongreßgebäude

Bürgerbräu-Wulle, Neckarstraße 50—58, in der Nähe des Hauptbahnhofs.

Korrespondenzanschrift

BI Kiefer, Sozialbüro (Ps 95) der Bundesbahndirektion Stuttgart; Basa 952/5503 oder 1156.

Sprachprüfungen

Auch in diesem Jahr werden wiederum Sprachprüfungen abgenommen. Anmeldungen umgehend erbeten an: BOAmtm Dr. Lang, Prüfungsamt bei der Bundesbahndirektion Frankfurt (Main); Basa 955/1501.

Atentu! Eksterlandanoj petu aliĝilon ĉe: Germana Esperanta Fervojista Asocio, sekretariejo (s-ino Kruse), 6 Frankfurt (Main), Karlstr. 4—6

Novaj libroj

La partícipa problemo

Kiel rimarkis prof. Collinson en sia antaŭparolo, tiu prezentado estas senpasia kaj objektiva — ĝi celas nek vundi nek ridindigi. Dum la tiel nomita „Simpozio“ (pri la ata/itaproblemo) ja prezentis unu flankon de la problemo, do estas juste, ke ĉiuj esperantistoj havu la okazon pripensi la argumentojn de multnombraj lojalaj samideanoj, kies opinioj ne akordiĝas kun tiuj de la „Simpozio“. Rigardite el tiu vidpunkto la verko riĉigas seriozajn esperantistojn, kiuj volas esprimi kristalklare gramatikajn tempojn. Ĉu la titolo konformas al la lingvosciencia enhavo, estas alia demando.

„Esperanto — moderna lingvo“ de V. Setälä, E. Vilborg kaj C. Stop-Bowitz. 136 paĝoj; formato 14,5 x 10,2 cm; prezo 15 steloj (4,50 DM). Unuopaj ekzempleroj livereblaj kontraŭ 9 resp. kup. de „Fondumo Esperanto, poŝtfako 18022, Helsinki, Finnlando“.

Deutschsprachige Werbung

Für die Werbung im deutschsprachigen Raum steht eine weitere, sehr geschickt aufgemachte Broschüre zur Verfügung, die sich im Untertitel eine „Darstellung mit besonderer Berücksichtigung ihrer Aufgaben für die Schule“ nennt.

El la grupoj

Duisburg. En la aĝo de 60 jaroj mortis la 12an de junio s-ano Gerhard Gester-mann, fervora membro de la Esperanto-grupo Duisburg-Wedau. Ni konservos bonan memoron pri nia bonkora samideano. Herrmann

Frankfurt. Okaze de la internacia kongreso de la flegistinoj en junio (5500 el 60 landoj) kelkaj esperantistinoj serĉis la kontakton kun lokaj grupanoj. Kiel oni esprimis, estis kvazaŭ „ĝuo“ konversacii en Esperanto post teda tradukado en la kongreslingvojn (germanan, francan, anglan, hispanan). La gazetoj fanfarone raportis, ke la simultana instalaĵo majstris bonege la lingvan barilojn. — La 14an de julio s-ano Ritterspach prezentis multajn, bonkvalitajn kolorbildojn pri la pasinta IFEF-kongreso en Hamar, kiuj vekis agrablajn rememorojn. La aŭskultantaro sekvis kun granda intereso la prelegon kun surbendigita origina muziko kaj alparoloj.

W. B.

Passau. La tiea grupo estas vigla kaj korespondas kun multaj eksterlandanoj. Pro la speciala situo de la limurbo Passau esperantistoj ofte interrompas sian vojaĝon por viziti siajn tieajn amikojn. Kiel atestis du grandskalaj raportoj de la 21a kaj 22a de aprilo en la ĵurnalo „Passauer Presse“, vekis specialan intereson la vizito de kelkaj hungaroj al la proksima loko Büchlberg.

Stuttgart. La Esperanto-kurso por komencantoj malfermita lastan aŭtunon ĉe la fervoja faklernejo finiĝis oficiale la 26an de aprilo per gaja festeto. Partoprenis ĝin ankaŭ membroj de la urba grupo kaj samideanoj el Jugoslavio kaj Hispanio. Oni kantis kaj ĝuis spritaĵojn de la societestro kaj kursgvidinto. — La 13/14an de majo kunvenis la BSW-komisiitoj de la fervoja distrikto Stuttgart. S-ro Kiefer, la komisiito por Esperanto, havis okazon pledi por la Internacia Lingvo kaj atentigi

Die Gliederung ist übersichtlich, der Inhalt dem Titel angepaßt. Nach informatorischer Einweisung über Wesen und Entwicklung der Internationalen Sprache wird auf das Bildungsziel der Schulen und den fremdsprachlichen Unterricht eingegangen. Besondere Aufmerksamkeit findet der Abschnitt „Esperanto als Unterrichtsfach“ sowie die jüngsten Ereignisse auf diesem Gebiet. Weshalb bei der Schlußbetrachtung die doch sonst anerkannten Erfolge der Eisenbahner-Esperantisten — z. B. praktische Verwendung des Esperanto in den Fahrplänen von sieben Eisenbahnverwaltungen — unerwähnt bleiben, ist nicht recht verständlich. Auch fehlen unter den Auskunft ertheilenden Stellen die Anschriften der Eisenbahner-Landesverbände aus dem deutschsprachigen Raum.

„Esperanto die internationale Sprache“. 24 Seiten; 14,5 x 20,5 cm; Preis 0,70 DM Herausgeber: Deutscher Esperanto-Bund, 85 Nürnberg 2, Postfach 2123.

Dreiländertreffen

Am 25. und 26. September 1965 werden sich Esperantisten aus der Schweiz, aus Österreich und Deutschland in Romanshorn (Schweiz) treffen. Wie in den vorangegangenen Jahren sorgt ein ausgewähltes Programm für einen angenehmen Aufenthalt am Bodensee. Höhepunkt wird die Einweihung einer Esperanto-Straße sein. Baldige Anmeldung erbeten an: Otto Walder, Waldmannstr. 10, 8590 Romanshorn, Schweiz.

pri la aŭtuna GEFA-jarkunveno. La gremio sekvis la prelegon kun intereso kaj petis la komisiiton transdoni specialajn salutojn al la IFEF-kongreso en Hamar.

Kiefer

Philatelie

LinZ (Donau). Anlässlich der Enthüllungsfest der Esperanto-Denkmal am 10. Juli war in Linz ein Sonderpostamt eingerichtet, das Gefälligkeitsabstempelungen ausführte. Der Rundstempel zeigte das Esperanto-Denkmal mit der Legende „Inauguro de la Esperantomonumento Linz/D“.

Hamburg. Auf der „Hamburg-Wandsbeker Briefmarken-Ausstellung“ am 2./3. Oktober wird unser Sprachfreund Mager, Frankfurt das Objekt „Esperanto auf Briefmarken“ ferner Stempel und Vignetten von Eisenbahner-Esperanto-Kongressen ausstellen. Die Ausstellung kann jeweils von 9 bis 18 Uhr in Hamburg-Wandsbek, Friedastraße besichtigt werden.

Ma

Ni legis en...

Aŭstria Esperanto-Revuo entenas en la julia eldono la programon pri la intertempe bone sukcesinta Eŭropa Esperanto-Konferenco.

Bulgara Esperantisto vaste raportas (en majo) pri la 6a tutlanda esperantista junulara festivalo en Dimitrograd.

Bulteno de la aŭstria sekcio de IFEF okupiĝas pri la jara ĉefkunveno komence de aprilo en Linz.

BULTENO de la finlandaj fervojistoj donas (en n-ro 1) ampleksan superrigardon pri la finnaj fervojoj en 1964.

Die **BUNDESNACHRICHTEN**, Organ des Bundes Deutscher Philatelisten, veröffentlicht (in Nr. 68) einen belehrten Artikel „Esperanto auf Briefmarken“ unseres Sprachfreundes Mager.

Die **Bundesbahnmittelungen** stellen heraus, daß die Spanischen Eisenbahnen als siebente Eisenbahnverwaltung Esperanto in den Kursbüchern verwenden.

DEFA-BULTENO, organo de la Dana Esperantista Fervojista Asocio, publikigas (en julio) pozitive pri la 17a IFEF kongreso en Hamar.

Die **Bundesbahn** weist in der Mai-Ausgabe auf die Unterschriftenaktion der deutschen Eisenbahner-Esperantisten hin.

Der Deutsche Bundesbahnbeamte tellt (im Juli) den erfolgreichen IFEF-Kongreß in Hamar heraus.

EL POPOLA ĈINIO prezentas (en n-ro 3) krom kolorriĉaj bildoj de junuloj la civilan aviadon de la lando.

En **Esperanto en Skotlando** la veterano Kennedy emocije raportas pri travivaĵo okaze de la UE-kongreso en Nürnberg 1923.

FERVOJISTO, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, laŭdas (en apr.) la varbfolion de GEFA „Esperanto — die Sprache, die Sie suchen“.

En **HUNGARA FERVOJISTA MONDO** riĉenhava kiel kutime, trovigas kortuŝa rakonto pri renkontiĝo de hungarino kaj nederlandano.

INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO, eldonata de la Societo por Internacia Lingvo, esploras (en jun.) interesan diskutadon en la radio Mainz pri la Internacia Lingvo.

ITALA FERVOJISTO publikigas (en n-ro 3/4) la inaŭguron de nova Esperanto-strato en Casalecchio di Reno.

Jugoslavia Fervojisto entenas (en n-ro 1) kontribuojon de la GEFA-ano Kirchgens „Kiel Esperantisto en Bela Palanka“.

En **La Fervojisto**, organo de la franca IFEF-sekcio, estas priskribata la fervora agado de la filino Lidja Zamenhof ĝis ŝia mortigo en 1944.

La Socialisto, organo de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, montras (en jun.) la varian signifon de la mono en la artikolo „Sorĉilo mono“.

muzilo, bulteno de la esperanta muzik-asocio, konatigas (en jun.) kun nova sistemo de muziknotoj. Ili estas kvazaŭ surpaperigitaj nigraj klavoj kun oktavsignoj.

Norda Prismo celas (en n-ro 1) demonstri bonkvalitan elekton el diversnacia, precipe skandinavia literaturo.

Svisa Fervojisto ilustras (en apr.) la nuntempan situacion de la landa asocio por la protokolo pri la ĝenerala kunveno en Solothurn.

THE WORKER ESPERANTIST, eldonata de la brita laboristaro, ekzamenas la demandon „Kio estas necesa por la solvo de la mondlingva problemoj?“

W. B.

Berichtigung

zu BULTENO Nr. 1/1965 Seite 3

Unter Vorstand ändern:

Sekretärin: „Basa 955/2759“ in „Basa 955/5615“

Wir bitten, diese Änderung besonders zu beachten.

Peto de la redakcio:

Dum la somero GEFA-anoj partoprenis internaciajn aranĝojn en en-kaj eksterlando. Ni esperas, ke kelkaj resumaj raportoj atingos la redakcion. Volonte ni publikigos ilin, bedaŭrinde sen bildoj.

La bildo

sur paĝo 1, disponigita afable de la „Verkehrsamt der Stadt Stuttgart“, montras rigardon el la kastela ĝardeno en Stuttgart al la stacidomo kaj la apuda hotelo.

Eksterlandaj legantoj!

Por korespondadoj al nia asocio volu uzi la sekvajn adresojn:

Prezidanto

„Germana Esperanta Fervojista Asocio, sinjoro Achim Giessner, 321, Elze (Han), Bahnhofstraße“

Sekretariino

„Germana Esperanta Fervojista Asocio, sinjorino Elfriede Kruse, 6 Frankfurt (Main), Karlstraße 4—6“

Redaktoro

„Germana Esperanta Fervojista Asocio, sinjoro Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main), Karlstraße 4—6“

Terminaraj aferoj

„Germana Esperanta Fervojista Asocio, sinjoro Gernot Ritterspach, 6 Frankfurt (Main), Karlstraße 4—6“

Aliĝu al nia jarkunveno en Stuttgart! Detaloj sur paĝo 2.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / presio: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.